GISTO, NOV-2007
Redaktas G. Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-11-

Kvaks!

En la pasinta Gaja Haveno oportunas la difino: la paradiza restadejo de krokodiloj estas marchejo.

ENNECESEJA POETO

Fekejo efikas kurioze,
Tie la roloj inversigxas.
Timulo batalas furioze
Kaj la kuragxulo fekigxas.

CHO-RO-I

La signalo de China Radio Internacia lastatempe, ekde la Printempo/07 tenas sin klara kaj forta = S-59+ laù radioamatoraj datenoj, kie 5 (de 1 gxis 5) signifas la klarecon de la modulado (parolado aù muziko) kaj 9 signifas la fortecon, la intensecon de la ricevata sendajxo. El tio validas diri ke S-59 samas la kompreneblon ekvivalentan al tiu inter du homoj situitaj unu antaù la dua. La variado dependas de la fado en la diversaj sezonoj de la jaro. Rimarkendas ke proksimigxoj de malaltaj aerpremoj kiuj alkondukas malbonan veteron kun stormoj/fulmoj/tondoj/pluvegoj kaj ofte hajlo ankaù suprizas per preskaù súbita fado, tiom ke de unu tago al alia la signalo povas fali de S-59 al nulo.

NAVIGAJ PROBLEMOJ

Tiaj fenomenoj, la variajxoj supre menciitaj, okazas ne nur en altaj r-frekvencoj (HF) sed ankaù en tre altaj frekvencoj (VHF) kaj tre-tre altaj (UHF). Krom tio, dum la flugo ene de nuboj kune kun pluveto, ofte okazas ke la signaloj senditaj de la kontrol-turo de flughavenoj farigxas tute ne aùdeblaj char la aviadilo estas ofte volvata de elektrostatiko, kiu blokas la antenon kaj ne tralasas la radio-signalojn dum eble 10 aù 20 sekundoj. Tiam la telegrafisto sendas signalon kun peto ke ricevendaj informoj estu sendotaj nur kiam li ordonas tion. Tiam oni esperas ke la intervalo inter unu blokado kaj sekva estos sufiche longa kaj ebligos ricevi la alterigxajn datenojn. Bildigu al vi la hhaùson kiam sur flughaveno restadas “staplitaj” pluraj aviadiloj, eble 10, chiu je 300m super la alia, ene de densaj nuboj kaj ankaù la navigaj aparatoj suferas blokadon kaj la radiokompasoj nur erarvagas sur ciferplatoj, nenion indikante al la pilotoj!! Bonsxance tia “infero” ne tro ofte okazas. Dum 15 jara flugado tio al mi okazis kvar fojojn, chiuj super Kongonjas (SP)

APARECIDA

Sabaton, 17/11, nia samlandanino Aparecida bele vizitparolis en China Radio (S-59+) dum multaj minutoj. Rimarkindas ke sxi ne falis en la fikutimon de brazilanoj: je chiuj pokaj vortoj ili diras la gxenan “né...né? kun la signifo kurte demandi/peti konfirmon: “Chun ne estas tiel?” – Plachus al mi ekscii la opinion de chinoj kaj aliaj, rilate la klaran prononcon de brazilanoj kiam ili parolas esperante.

- Rimarkeblas ke azianoj suferas por prononci la literon-L. Tial oni ofte aùdas “probRemoj, pubRiko, respubRiko” kaj aliajn. Oni alkutimigxas, komprenas kajpardonas la simpatiajn parolistinojn

ENKETO

Kara legant(in)o, BV bildigi al vi la fakton, ke la redaktoro de Gisto anoncas sian decidon baldaù haltigi la eldonadon de chi bulteno. Kiun iniciaton vi alprenus, por ke Gisto daùru viva chiumonate liverante simplajn legajxojn kun la celo teni nian verdan komunumon almenaù mense fidela kaj aktiva? – La aktivado ja povus esti multe pli intensa, se chiuj legantoj priatentus erojn proponitajn. La manko de reagoj mortigas la entuziasmon, la animon de chiu entrepreno. Ekzemple: de pli ol unu monato mi leteris al GEA-estraro, demandante chu oni arangxos festan tagmangxon dum la Z-tago 15/12/07 plus alia demando ril. mian GEA-anecon. Gxis hodiaù, 19/11, mi estas premiata per tomba silento. Se pro miaj proponoj mi farigxis “persona non grata” (tiel sxajnas), mi promesas kasxi mian sensignikecon tuj post kiam tio konfirmigxos. Se vi domagxas elspezi por unu posxtmarko responde al mi, petu ke mi chiam aldone ensendu novan posxtmarkon, kiam mi demandas ion. Memorendas ke kiam mi sendas la bultenon Gisto mi elspezas minimume po unu Realon kaj rajtas postuli repagon pro la fakto ke mia ago celas venigi al la babila rondo de nia Verda Kafo chiujn aktivulojn.

DISTRA LEGAJXO

Delonge mi revas havigi al ni nacilingvan tekston, ne didaktikan, sed jes prosan verkon kiu ruze interesigos ne-esperantistojn pri gxia enhavo. Laù mia penso estus vasta ebleco prezenti vortojn lerte kunmetitajn per la jxonglado kun prefiksoj kaj sufiksoj krom prepozicioj kaj adverboj. La celo estu montri la flekseblecon de nia lingvo, sen trudi sed jes igi amil a lingvon. Laù mi, niaj kleruloj, Dr. Solon, la geedzoj Zaghetto, Instr. Cezar, por ne tro longigi la nomaron de niaj kapabluloj. Bv kandidatigxi.Ek al...

PROPONO

Ba!, jen mi denove per miaj achaj proponoj! Jen Gxi: ke dum unu el la paroligaj kunsidoj far Cezar aù Marcelo, okazu la “interpretado” de signifoplenaj frazoj troveblaj dum Gisto-legado. Prave mi pensas ke eble multaj legantoj ne plene komprenas ech la anekdotojn.

ELIZABETH

Lastan semajnon mi provis telf-kontakton al nia diligenta Elizabeth. Iu respondis kaj mi ekparolis en Esperanto. La persono diris ion de mi ne komprenitan kaj chesigis la kontakton. Tagojn poste mi ripetis la provon. Tiam respondis Roza. Sxi estis iom trista kaj diris ke Elizabeth restadas en Hospital Espírita, ke sxi lante resanigxas. Sed, ke sxi ankoraù ne scias kiam sxi ricevos kuracistan permeson hejmen iri. Detalojn povas ricevi geamikoj kiuj vizitos sxin.

Bonhumoro.

ENGAZETA ANONCO

“Edzigxonta fraùlo serchas kontakton kun sperta edzo, kiu konvinku lin ne fari tion.“

HEJMA KONFLIKTO

Junaj geedzoj havis konflikton hejme kaj poste, dum la peraùta promenado tra bela kamparo, ambaù obstine silentis. Ili preterveturis gregon el sinpasxtantaj azenoj. La edzo mentone indikis la gregon kaj, mokacele, chu parencoj viaj? – Jes, el viaflanka brancho, diris sxi.

VORTOSXPAREMA EDZO

Sinjorino malsanas kaj ne povas iri al la dimancha diservo. Sxi sendas sian edzon tien. Reveninte, sxi pridemandas: Nu, chu la diservo estis bela? – Jes. – Chu la pastro predikis? – Jes. – Chu vere, pri kio? – Jes, pri pekado. – Kaj kion li diris? – Li kontraùas.

TRIANGULO

Amiko:-Nu, vi hodiaù trista kaj pensema? Kio okazis? Chu sxi forflugis? – Ne, sxi revenis.

NUR POR BRAZILANOJ.

Vi veturigas tra kamparo. Flanke de la sxoseo vi eklegas platon kun vertikale skribita anonco:

VENDO
ESTE
RCO

Kion la kamparano vendas?
Pri kio vi pensas? Mielo,tangxerinoj,pansxmiro?